

Stine Andresen,
Swet hiamelkhaid

Min hart as din, an dü beest min,
swet hiamelkhaid as min an din,
wi brük diartu nian freemen.
Jä, swet as't, wan't noch hiamelk as,
wi tau alian, wi witj at was,
an ölers witj at neemen.

Mi tankt, ik haa di loong ei sen;
wiar dach de dai, de dai iarst hen,
an wiar a san ferswünjen!
Dan wurt at inj, dan komt a naacht;
stun muun an stäären üüb a waacht,
dan slau a lokelk stünjen.

Do leit at hüs uun jipen druum,
a fögler sliap uun bosk an buum,
ik sat uun guard tu teewen.
Man hartleew frinj, do kom man juart, -
dü käänst a wai troch naibüürs puart, -
man eewen, - eewen, - eewen!

*Verkinto de tiu çi Frisa poemo estas STINE ANDRESEN (geb. Jürgens, *1849-12-23 – †1927-05-13).*

Arg-15-23 (2003-10-12 00:45:03)

Ik foon detheer dachting uun det buk "Eilunfresken / Insel-friesen, Lebensbilder aus Nordfriesland" de Jakob Tholund, Noordfriisk Institut, Bredstedt.

Stine Andresen,
Dolça sekreteco

tradukita de Manfredo Ratislavo

Mi estas via, estas vi
en mia kor', kaj tio çi
sekreto estas nia.
Sekreto dolça estas ĝi,
ĉar scias ĝin nur ambaŭ ni
kaj certe ne alia.

Mi longe ne plu vidis vin!
Aĥ, estu jam de l' tago fin'!
Foriĝu jam la suno!
Feliĉaj horoj venas ja
por ni, dum nokte brilas la
stelaro kaj la luno.

Karulo, kiam en la dom'
profunde dormas ĉiu hom',
mi sidos atendente
vin enĝardene. Venu vi
la pordon - ĉar bruetas ĝi -
mallaŭte malfermante!

*Traduko de la Frisa poemo "Swet hiamelkhaid" de STINE ANDRESEN (geb. Jürgens, *1849-12-23 – †1927-05-13) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2000-07-31.*

Arg-15-24 (2014-02-14 13:14:47)

*Pri la poetino vidu la vikipedajn retejojn
http://de.wikipedia.org/wiki/Stine_Andresen
kaj http://frr.wikipedia.org/wiki/Stine_Andresen.*